

Usona Esperantisto № 2022:5 (sep-okt)

Anoncoj

Nomuma komitato; Ludu ŝakon parolante Esperanton;
Ĉiu numeroj de *Kontakto* haveblaj rete

De la estraro

Dumonataj raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Media hits

Smithsonian Magazine, The Conversation, Communities Magazine

Solvo de la enigmo en n-ro 2022:4

enigmo-solvoj

Solvo de la pasintnumera krucvortenigmo.

Bimonthly expense report

de la centra oficejo • Vilčjo HARRIS

Expense report from the CO for August and September.

La vivo de Peĉo

Šercoj • Timothy BORONCYK

La dudek-tria en serio de Timothy BORONCYK.

Mezuri distancon dikfingre

scienco • Barry FRIEDMAN

Kiel taksi distancon uzante nur dikfingron.

Credit where credit is due

Ieterkestoj • Philip David MORGAN

"I enjoyed Brandon Sowers' report on the recent UK, but I noticed one mistake."

Saying "Thank You"

language corner • Lee MILLER

How do you say, "Thank you for accepting me?"

Sabaton

senintenca esperantajo • Hoss FIROOZNIA

"Kaj metalrokemuloj observu la Sabaton, ĉar ĝi estas sankta por vi ..."

Mikronoveloj

Novaj centvortaĵoj.

More software suggestions for building vocabulary

lingviko • Joshua HOLZER

A previous article explained the benefits of spaced repetition software, and specifically Memrise. I wanted to add a few more suggestions.

Sensata

senintenca esperantajo • Greg KIRCHMAIER

T-ĉemizo por kontraŭuloj de la Sennacieca Asocio Tutmonda.



Anoncoj

Nomuma komitato

La Nomuma Komitato por la jaro 2022–2023 havos la jenajn membrojn:

- Elle BECK
- Aaron COX
- Rachel HELPS
- Rafa NOGUERAS
- Brandon SOWERS
- Carter WILLIAMS



La komitato serĉos taŭgajn kandidatojn por la jenaj postenoj:

- Prezidanto
- Vic-prezidanto
- Direktoro (2)
- Ĝenerala Direktoro de la Centra Oficejo

—Jorge Rafael NOGUERAS

Ŝakludu kun ni!

E-USA jus kreis ŝakan fakgrupon kun du celoj:



1. Gui ludi kune kun aliaj esperantistoj en amikeca etoso.
2. Inviti ne-esperantistojn ludi kun ni, por ke ili eksciujon pri Esperanto.

Kiel vi certe scias, ŝako estas batalo sur tabulo inter du personoj. Ĝia nuna formo aperis en suda Eŭropo dum la dua duono de la 15-a jarcento kaj evoluis el Ĉaturango, simila sed multe pli malnova ludo el Hinduo. Hodiaŭ, ŝako estas unu el la plej popularaj ludoj, ĝuata de milionoj da homoj tutmonde!

La nova grupo ludas kaj parolas Esperanton rete ĉiun mardon, vespere je la 18-a horo en Kalifornio (21-a en Novjorko). Ni uzas ĉambretojn en Zoom kaj la

senkostan ŝakprogramon **Lichess**

<<https://lichess.org/>>.

Por partopreni, bonvolu kontakti s-ron Karlo GERMANY ĉe cjgermany@gmail.com. Ni esperas ludi baldaŭ kun vi!

— Will MORTON <will.morton1@verizon.net>

Ĉiuj numeroj de *Kontakto* nun haveblaj rete

Post la disponigo de diversaj ciferecigitaj historiaj numeroj de la revuo *Esperanto*, ĉiuj historiaj numeroj de **Kontakto** <<https://uea.org/revuoj/kontakto>>, do ekde la jaro 1963, kaj aldone **TEJO Tutmonde**



<https://uea.org/revuoj/tejo_tutmonde> (1983–2010) estas nun senpage elŝuteblaj en la retejo de UEA.

Ĉi tiu donaco al la Esperanta komunumo ŝuldiĝas al la kunlaboro por ciferecigo de la historiaj numeroj fare de TEJO-volontuloj en la Centra Oficejo kaj de la laborgrupo, kiu nuntempe dediĉas sin al verkado de libro pri la historio de la esperantista junulara movado. Pri tiu projekto oni povos legi en *Kontakto* mem, aŭ **spekti videon pri ĝi** <<https://youtu.be/t7mkEiRrPrY>> en la YouTube-kanalo de TEJO.

UEA alvokas la komunumon subteni tiujn laborojn per **aligo al TEJO** <<https://uea.org/alighoj/alighilo>>, ĉu kiel membro aŭ patrono, **abono al la revuo** <<https://uea.org/alighoj/abonilo>> (elektronika abono kostas ekde nur 6 EUR jare), aŭ donaco al la fondajoj **Canuto** <<https://uea.org/alighoj/donacoj/canuto>> kaj **Junularo** <<https://uea.org/alighoj/donacoj/junularo>>.

De la estraro

Lastatempaj agadoj

Charlotte estas Sekretario de E-USA. Oni povas kontakti ŝin ĉe liquidfireangel@gmail.com.

Plejparte, mia lastatempa agado en Esperantujo estas, ke mi penas iom pli bone organizi informadon por la estraro, kaj, ke mi partoprenas en la LKK, la Loka Kongresa Komitato. En mia estrara laboro, mi penas organizi nin iomete per Trello, mi memorigas estraranojn pri farendaj aferoj, kaj mi skribis dokumenton pri niaj fondusoj – kion ili faras, kaj kiel oni decidas pri elspezoj en ĉiu. Atendu tiun dokumenton ĉe nia retpaĝo. En mia laboro kun la LKK, ni renkontiĝas ĉiusemajne rete, kaj ni diskutas gravajn aferojn, inkluzive buĝeton, programaron, temon, kaj specialajn gastojn. Se vi iam ajn pensas, “ho, mi tiom volus partopreni la movadon plu, sed kiel?” Do, eble via urbo povus gastigi la postan Landan Kongreson, en 2024! Se vi tion volus, kontaktu min, aŭ la estraron. Pro la magio de Interreto, la LKK eĉ ne plu devas esti loka. Mi mem helpas pri la venonta kongreso en Raleigh, malgraŭ tio, ke mi estas en Teksaso. Ni povos helpi ankaŭ vin gastigi kongreson en via urbo!

— Charlotte BURTON, Sekretario



Finfine flugas la fenikso

Hoss estas Redaktoro por E-USA kaj ankaŭ unu el ĝiaj Direktoroj. Kontaktu lin ĉe hoss@lodestone.org.

Post longaj paŭzoj kaj multaj obstakloj, la dua eldono de *Peter Jameson's Secret Language* estas nun finfine havebla.

Oni povas **elŝuti la bitan formon senpage ĉe nia retbutiko** <<https://bit.ly/3Tg5khf>>, kie ĝi troviĝas en kaj PDF- kaj ePub-



dosierformoj. La sama bitlibro aĉeteblas ankaŭ ĉe anglalingvaj retbutikoj (ekz. Amazon, Barnes & Noble, Apple Books) kontraŭ la plej malalta prezo permesata, \$0.99.


La papera formo estas havebla ĉe Amazon, B&N, Bookshop.org, kaj aliaj vendejoj. Ankaŭ tiukaze la prezo estas la minimumo postulata de la vendejoj, proksimume \$4.

Mi kore dankas al la multaj provlegantoj, inkluzive de Anna BENNETT, Sheila DEVLIN, Ruth KEVESS-COHEN, Creede LAMBARD, William PATTERSON, Benson SMITH, kaj Gregory WASSON. Kun la editorado helpis Rafa NOGUERAS, kaj Debra HAMEL meritas apartan dankegon pro ŝia vere herakla editora laboro.

Por tiuj, kiuj ne jam konas la libron: *Peter Jameson's Secret Language* estas ĉarma, anglalingva rakonto de nia kara forpasinta membro Sylvan ZAFT. En lia romano, unue eldonita en 1996, li priskribas la strebojn de fikcia, bazlerneja amikaro. Ili serĉas “sekretan” komunikilon, kiun nek instruistoj, nek malamikaj samlernejanoj povos kompreni. Finfine ili trovas specialan lingvon facile lerneblan, sed ne vaste konatan ... Nu, ĉu vi povas diveni? Kiam ili komencas uzi tiun lingvon en la lernejo, tamen, la lernejstro kolere malpermesas ĝin, kaj la junuloj klopodas elturnigi.

Laŭdire la rakonto estas por infanoj, tamen ĝi klare celas ankaŭ plenkreskulojn.

Prezentante atentokaptan intrigon, ĝi instruas multon pri la “sekreta lingvo” kaj ĝia historio. Tial la libro povas esti efika informilo, utila por disdonado al interesitoj ĉe klubkunvenoj aŭ lingvofoiroj. Aŭ, kiel proponis Chuck MAYS en № 2021:4, oni povus eĉ lasi ekzemplerojn en senpagaj biblioteketoj (*Little Free Libraries*).



Aperas nova eldono de *Peter Jameson's Secret Language*.

Efektive, ĝuste atendante ĝian uzon kiel informilon, ni aldonis apartan paĝon por reklamoj fine de la

libro. En la supra duono aperas informo pri “sekreta retpaĝaro” ĉe E-USA, kaj la malsupro restas malplena por aldono de lokaj reklamoj – glumarko aŭ stampo pri via loka klubo, ekzemple.

Por helpi al kluboj kaj aktivuloj, ni nun ofertas paperajn ekzemplerojn rabatpreze al tiuj, kiuj volas aĉeti pli ol 20 samtempe. **La kosto estos nur po unu dolaro.** Do kontraŭ \$40, ekzemple, oni ricevos 40 librojn – sen imposto aŭ sendokosto. Se vi volus utiligi la libron en via informado, bv. kontakti nin (ĉu Esperante, ĉu angle) ĉe <publishing@esperanto-usa.org>.

Sekreta retpaĝaro por sekreta lingvo

Kun la tre afabla helpo de membro Creede LAMBARD ni faris akompanan retpaĝaron por la libro. Ĝi enhavas pli da informo pri la “sekreta lingvo”, respondas diversajn demandojn, kaj eĉ prezentas preseblan atestilon por infanoj, kiuj volas aliĝi al la “klubo” de Peter. Ligiloj al la retejo troviĝas ĉe la fino de la libro, en formo de tajpebla URL kaj komputile skanebla kodo.

— Hoss FIROOZNA, Direktoro

Board Meeting, September 10th, 2022

Ĉeestas: Alex Miller, David Beck, Charlotte Burton, Fred Meyer III, Jane Shevtsov, Ruth Kevess-Kohen

Ĉeestas sen Voĉdonrajtoj: Bill Harris

The board informally discusses various points of order and goals for the new board. Among these suggestions: addressing the list of Action Items to determine which are completed to our satisfaction or can otherwise be removed or delegated, finding a way to support member participation, finding a way to delegate so as to prevent board burnout, and finding a way to improve communication with committees such as the publicity committee. Response time and compromise is suggested.

Alex, as vice president, presides over the meeting. After calling it to order, he suggests we go through the standing reports and then the “farendaj agadoj”

Standing Reports

Treasury

Two more fund reports are coming from fund managers, and the member body voted to include a \$500 promotional

budget. The body also voted to rename the Educational Video Fund to the Educational Media Fund, which the treasurer asks the Director to do. In inquiring on how this should work, it is clarified that this means the Board will find a way to use \$500 out of some fund in order to promote Esperanto, and that we will want to report this activity to the members at the LK in the coming year, and likely future years as well.

(Vice) President's Report

Six members were approved for equal portions of the \$1000, as voted by the board. David moves that we change the amount we are giving them to \$166. Ruth seconds. Alex asks for further discussion and calls for a vote. 5 board members vote in favor with Jane abstaining. The motion passes, and Bill is instructed to send this money out to the relevant members. American Good Film Festival is on track as expected. The LKK of the UK gifted us (via Alekso) a series of smaller items as well as some larger mural posters and signs. Charlotte recommends that we mention these gifts to the LKK, and they can plan within the Kongresa Budget for how to use or reprint the signs for these frames. Charlotte also briefs the board on some of the action of the LKK. Alex also reminds the board that we agreed during UK to create a clear agenda for the Solena Malfermo, Aferkunsido, and Solena Fermo, with a deadline of 2 months before the upcoming LK. Charlotte volunteers to send an email to Orlando and Phil to request that they, as current and former president of E-USA, list out what the usual order of business is at these three required sessions, so that an incoming president and vice president (as well as members who would like to give input at these sessions) knows what the usual order of business is at these things. Discussion arises of how to create a process that enables the smooth transition of power.

Central Office

This is a quiet time for the office, and there is nothing to report.

LK Discussions

Charlotte and Fred answer questions about how the funds and the Congress Budget work.

Kultura Agado

The discussions at the recent LK have resulted in members creating a podcast, Usone Persone. Alex suggests that Esperanto-USA should officially support this podcast in some way, as it resulted from discussion that our members had during work sessions we ran during our LK. Fred clarifies that what they are doing is slightly different than what was discussed about a podcast for beginners or post-beginners. Ruth mentions a podcast called Streetwise Hebrew which does something similar. Alex and Brandon are discussing digitally how we can help this existing member podcast. Ruth and Alex discuss the pros and cons of offering money for equipment versus man-hours, etc. Charlotte recommends that the board's support for projects

such as these could be to facilitate the grant proposal process, such as by offering the link to the grant proposal form, suggesting relevant funds, etc.

Appendix A (Slack)

Alex Miller: I move that we set aside 10 stipends of \$100 USD to be sent to 10 attendees of the 2022 Universala Kongreso in Montreal who became ill while there and accrued sudden additional costs (primarily through hotel bills while quarantining or having to miss work). We will refer to this as our “Ano-Sano” project. Preference will go to members of Esperanto-USA first, followed by non-members with American citizenship, and finally attendees from other countries until at least 10 qualified people are found whom we can help through this project. We will announce this special project on our website and on YouTube and have people email us their information. We will keep their individual names private since their personal health and privacy is at stake. We will mention how many people are being helped but absolutely not mention who specifically received help except as required by law. The \$1000 needed for this program will come from our Goldman Fund.

Phil Dorcas: I second this proposal.

Alex Miller: Before voting begins, I'd like to slightly amend one phrase in the motion. Instead of “followed by non-members with American citizenship,” I'd like it to say “followed by non-members living in the US” so that we aren't required to provide documentation of a person's citizenship which could be another sensitive privacy issue. I'd rather we somewhat rely on the honor system on that issue.

Phil, if you're okay with that slight rewording, please call the matter to a vote so that we can continue.

Fred Meyer, III: After a motion, it is usual to call for discussion.

Alex Miller: Fred, that doesn't align with what Charlotte posted here on Dec 12th 2020:

Procedure:

A board member makes an official motion.

Another board member seconds.

The president restates the official motion and calls for a vote.

All board members have up to 7 days from the time of the president's message to vote yes or no, or else abstain.

After the 7 days have passed, the president declares the results of the vote, to be included in the minutes of the following monthly meeting.

No other messages should appear in this channel. All discussion regarding motions may occur in the

“estraranoj-only” channel or other relevant channels.

Alex Miller: I followed up on Dec 13th 2020 with this clarification about our procedures for this channel:

We need to clearly establish the precedent here that one person proposes a motion as a single post. Then a second person seconds it in a second post. Only then does the president (or acting president) in a third post officially restate the motion and call it to a vote. Phil's post above proposes the motion and immediately asks for votes (as well as asking for corrections to be spelled out here which would lead to unwanted clutter on this channel).

Let us view Phil's above post as a proposal only. We then see that Charlotte seconds that motion. As acting president, I now officially call for a vote. – Do we accept the minutes of today's (Dec. 12, 2020) board meeting as prepared by Charlotte Burton? – You have until December 19th to vote.

Please respond with the words “Yes”, “No”, “Abstain”, or “See note in #nameofchannel” if you have new information to add or questions to ask before giving your vote. Let's keep the discussions elsewhere so that all we do here is quickly tally up votes. I encourage us to fully understand an issue before voting because once you cast your vote here on a matter, it cannot be changed and will be recorded in the monthly minutes.

If you would like to discuss a matter further before voting on it, the current procedure is for you to write “See note in #insertnameofchannel” and we can there find your thoughts about the matter. As a side note, I already called for a discussion by bringing this up in our estraranoj-only channel where 5 people said they were in favor of it. There hasn't been further discussion there for several days so I'm moving it here so that the momentum doesn't evaporate. If Phil's seconding of the motion here can be seen as approval, then we have 6 out of 10 board members who have said they are already for it.

Phil Dorcas: I call for the vote.

Charlotte Burton: I vote yes.

Jane Shevtsov: yes

Hoss Firooznia: yes

Fred Meyer, III: yes

Phil Dorcas: The proposal has passed. It is approved.

Alex Miller: Thank you. For future reference, is my calling for the motion interpreted automatically as a yes vote from me? Same question for when Phil seconded the motion. We did not separately vote yes here but we seem to be acting as though we both did in order to say the proposal passed so what is our policy on that?

Timothy Boronczyk: I vote yes

Board Meeting, October 8th, 2022

Ĉeestas: Filipo Dorcas, Alex Miller, David Beck, Charlotte Burton, Fred Meyer, Tim Rice, Ruth Kevess-Cohen, Hoss Firooznia

Ĉeestas sen Voĉdonrajtoj: Vilčjo Harris

Alex calls the meeting to order. We have a quorum.

Standing Reports

Central Office

The Ano-Sano recipients have been sent their money, and the office email has been moved from Thunderbird to Gmail, to support future readiness. Point of mention from Alex: At such time as Bill should eventually wish to retire, we will need to have the nominating committee conduct an open search, per member vote at the UK. Hoss points out that, per the bylaws, the Board of Directors makes the decision. Bill clarifies that he has not thus far thought about or planned on imminent retirement, so the point is not immediately necessary. Hoss clarifies that he plans to no longer be the editor as of the end of 2023, and that the board is now overdue for a new webmaster. Bill intends to put the accounting stuff online, and no apprentice CO director can be appointed until that time. Currently, Director of the CO averages out to be about 30 hours/week. This will be a difficult job to find a replacement for. Charlotte recommends that we ask the nominating committee to look for a more immediate replacement option for Newsletter Editor and for Webmaster as well as a more distant option for Director of the CO, to act as an apprentice in the meantime. Ruth requests that someone write up a job description for Director of the CO. Action Item: Bill will draft a job description for Director of the CO, which Phil will review. Phil points out that many important jobs do not have an up to date job description, and that this should be something reviewed annually. Action Item: Phil will write a list of committees, committee heads, and a brief description of each committee, to be completed before the November 2022 board meeting, with progress being reported to the board weekly. After this time, we can prioritize making a list of what occurs at various important meetings at the LK.

Old Business

1910 Film

Brandon and Alex have written a detailed proposal regarding the publication of the film of Ĵenja's 1910 play. \$500 has been raised from private donors. \$500 has been donated by the LKK of the Montreal UK, and \$1000 has been matched by ESF, all with the explicit intent of these donations being used to support the 1910 project. The Goldman Fund will be acting as a middle man for this money in order to facilitate it. In the future, all such grant requests will be made up front.

LKK

The LKK wishes to add \$50–100 into the LK budget for a logo design contest. Tim B has the names of 3 graphic designers who have volunteered their services to E-USA.

Flier Request

The secretary will be forwarded any emails to the CO and will have the additional job of scanning the emails to be sure they went to the right person.

Expenditures

Fred expresses concern regarding whether we have seen the expenditures from the last month. This was sent to some people but not to the whole board, which will quickly be addressed.

Film Festival

The deadline has officially passed, and we now officially have over 100 short films in Esperanto due to these contests.

Publishing Fund

The publishing fund is officially publishing *Peter Jameson's Secret Language*.

Treasurer

The market is doing poorly, but the expenses list has now been sent. The grant request for microphones to support a podcast from the Educational Media Fund has also been fulfilled.

Media hits

Smithsonian Magazine

Member Joshua Holzer was busy on Esperanto Day in July: he had articles about the language published in no less than three magazines.

First, an **article he wrote for *The Conversation*** <<https://bit.ly/3f26qyH>> was also picked up by *Smithsonian Magazine*. Titled ***Why Hitler and Stalin Hated Esperanto, the 135-Year-Old Language of Peace*** <<https://bit.ly/3eZn7Ls>>, the article provides a brief overview of the language and its history, concluding with the link between Esperanto and pacifism:

... the word “Esperanto” means “one who hopes.” Some may argue that it is idealistic to believe that Esperanto could unite humanity, especially in the midst of another major war.

But even the most violent wars don’t end without peace talks, which often require translators to interpret the languages of the opposing parties. Zamenhof wondered whether violence itself might be less common if a neutral language could help people bridge their divides.



EUobserver

Joshua Holzer’s second article from July appeared in the Opinion section of the English-language *EUobserver*, published in Brussels, Belgium. Titled **“Happy Birthday, Esperanto! ‘Language of peace’ turns 135”** <<https://euobserver.com/opinion/155462>>, it mentions Zamenhof’s peaceful aspirations for the language, the resolution of UNESCO, and the support for Esperanto from multiple winners of the Nobel Peace Prize.



An excerpt:

Bullets and bombs are often the tools of battle, but only diplomacy can definitively end a war—and diplomacy requires language.

When Russia and Ukraine eventually sit down to negotiate peace, in which language should the treaty be written?

Ukrainian? Why would Russia agree to have a treaty written in a language that they regard as a mere dialect of Russian?

Russian? For Ukrainians fighting to preserve a unique and distinct cultural community, such an outcome would look a lot like defeat.

Given the EU’s support of Ukraine, Russia would likely also be opposed to having a treaty written in any of the bloc’s 24 official languages.

Similarly, given China’s stance towards Russia, Ukraine would likely be opposed to a treaty written in Chinese. The problem is: nearly all languages would be biased in one way or another.

Esperanto, on the other hand, is the national language of no country. Esperanto is neither pro-Russian nor pro-Ukrainian. Rather, Esperanto is a neutral, international language intended to help people bridge their divides.

Communities Magazine

The Fall 2022 issue (#196) of *Communities* magazine

<<https://www.gen-us.net/communities-196-the-language-of-community/>>

published an article by member Jeremy Genovese titled "Esperanto: The Rise, Fall, and Rise of an Intentional Language Community."



The article is especially apropos, given that the theme of the issue is *The Language of Community*. The author presents a general introduction to the language, its history, and culture, and it touches on the interest in Esperanto that has accompanied the rise of the Internet:

... Esperantists could communicate rapidly, first with message boards and email, later with Skype and social media. There are now internet platforms, such as Lernu.net and Duolingo, where

one can learn the language. This process was vastly accelerated by the pandemic, when many Esperanto groups migrated to Zoom and similar online services ...

It concludes with a description of the author's personal experiences with the language:

I now have friends and acquaintances in places like Brazil, Egypt, and India, whom I never would have met outside of the Esperanto community.
[...]

As a native English speaker I may enjoy an advantage over those who come to English as their second language. Except for a handful of people who learn Esperanto as young children, for the majority of Esperanto speakers it is our second language. Thus, our conversations take place on a much more equal playing field.

Solvo de la enigmo en n-ro 2022:4

enigmo-solvoj



Jen la ĝusta solvo de la krucvortenigmo en № 2022:4. Gratulon al la ĉi-foja gajninto en la lotumado, **Jerry G. Johnson**, kiu ricevos \$10-rabaton de la libroservo.

Dankojn kaj laŭrojn ankaŭ al niaj aliaj solvintoj: Arlyn KERR, Rafa NOGUERAS, kaj Ellen EDDY.

Bimonthly expense report

de la centra oficejo • Viljo HARRIS

DATE	PAYEE	AMOUNT	ACCOUNT	MEMO
2022-08-01	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2022-08-05	STAPLES	13	Office Expenses	copy paper
2022-08-12	Federal & State Payroll Taxes	186	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2022-08-12	Federal & State Payroll Taxes	709	Salaries	Employee taxes
2022-08-12	HARRISWB	1722	Salaries	payroll
2022-08-14	BOA CC 7572	11	Internet Access	Dreamhost bill
2022-08-14	BOA CC 7572	20	Internet Access	website
2022-08-14	BOA CC 7572	40	Credit Card Expenses	Payflow
2022-08-14	BOA CC 7572	45	Telephone/Fax	800 number
2022-08-14	BOA CC 7572	138	Cost of Catalog Sales	Packing materials for retributiko
2022-08-16	ADP	59	Payroll Fees	fees
2022-08-16	ENDICIA	16	Catalog Service Postage	monthly charge
2022-08-22	BOA CC 7572	11	Internet Access	Dreamhost bill
2022-08-22	BOA CC 7572	40	Credit Card Expenses	Payflow
2022-08-22	BOA CC 7572	45	Telephone/Fax	800 number
2022-08-22	BOA CC 7572	45	Office Expenses	Avira anti-virus
2022-08-25	ESF-V	95	Goldman Fund Expenses	Gufujo at NASK
2022-08-25	ESF-V	150	Goldman Fund Expenses	Welcome reception at NASK
2022-08-25	ESF-V	250	NASKE Fund Expenses	Stipend - Aaron Cox
2022-08-25	ESF-V	250	NASKE Fund Expenses	Stipend - Kevin Ring
2022-08-25	ESF-V	499	NASKE Fund Expenses	Stipend - Alex Miller
2022-08-31	PAYPAL	51	Credit Card Expenses	Fees
2022-09-04	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2022-09-13	Federal & State Payroll Taxes	186	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2022-09-13	Federal & State Payroll Taxes	709	Salaries	Employee taxes
2022-09-13	HARRISWB	1722	Salaries	payroll
2022-09-14	ENDICIA	16	Catalog Service Postage	monthly charge
2022-09-17	ADP	59	Payroll Fees	fees
2022-09-22	BOA CC 7572	11	Internet Access	Dreamhost bill
2022-09-22	BOA CC 7572	20	Internet Access	ttt website
2022-09-22	BOA CC 7572	40	Credit Card Expenses	Payflow
2022-09-22	BOA CC 7572	45	Telephone/Fax	800 number
2022-09-28	UEA-V	3000	UEA konto	al ELNA-konto elna-w - 3099.75 EUR
2022-09-23	Becklin, Hans E.	600	Video Fund Expenses	grant for video equipment
2022-09-30	PAYPAL	26	Credit Card Expenses	Fees

La vivo de Pejo


sercoj • Timothy BORONCYK



Teksto kaj ideo de Timoteo; desegnaĵoj de "Awesome Satyr". (Kaŝnomo, kompreneble. Timoteo klarigas, ke la artisto preferas resti anonima.)

Mezuri distancon dikfingre

scienco • Barry FRIEDMAN



Kiom malproksime estas tiu konstruaĵo? Tiu arbo? Estas facila maniero sci.

Jen kiel ĝi funkcias:

1. Tenu la dikfingron antaŭ la vizaĝo (kun la brako plene etendita), kaj fermu unu okulon. Vicigu la dikfingron kun objekto, kies larĝon vi jam scias (ekzemple aŭto).
2. Sen movi la dikfingron, fermu la malfermitan okulon kaj malfermu la alian. La dikfingro nun

ĉirkaŭ 15 futojn larĝa, do se la dikfingro nun troviĝas je distanco de duona aŭtolongo, ĝi moviĝis ĉirkaŭ 7,5 futojn.

3. Taksu, kiom for la dikfingro "moviĝis" rilate al la rigardata objekto. Ekzemple, aŭto estas ĉirkaŭ 15 futojn larĝa, do se la dikfingro nun troviĝas je distanco de duona aŭtolongo, ĝi moviĝis ĉirkaŭ 7,5 futojn.
4. Dekobligu la kvanton. En ĉi tiu ekzemplo, la aŭto estas ĉirkaŭ 75 futojn for.

Tiu ĉi lertaĵo funkcielas pro tio, ke la distanco inter okulo kaj dikfingro estas dekoble pli granda, proksimume, ol la distanco inter unu okulo kaj la alia. Ĝi ne donos al vi precizan distancon, sed kiel ilo por taksi, ĝi efektive funkcias!



Barry FRIEDMAN

Barry estas esperantisto jam de preskaŭ 20 jaroj. Li ŝatas basbalon, lingvojn, kaj manĝi pasto-ringojn.

<bfriedma@chemistry.ohio-state.edu>

Credit where credit is due

leterkesto • Philip David MORGAN

I enjoyed Brandon Sowers's personal report in issue 2022:4 on the recent *Universala Kongreso* in Montréal, but I noticed one mistake near the end of the paragraph for Day 6 (11 August):



... Thursday's program was *unike elstara*: the debut of 1910, a new play about Zamenhof's visit to Washington and Montreal in 1910, written and directed by Jenja Amis [...] Several other

Americans played major and minor parts in the play: Alena Adler played the supporting role (outstandingly, I should say!) ...

According to **the official website for the Montréal UK** <<https://esperanto2022.ca/eo/nova-teatrajo-furoris/>>, Jenja Amis is named as author and producer, while Alena Adler (mentioned in the above passage) was named as director.

Elkore dankon.

Thanks for the correction, Philip. The web version of the article has been updated. – Ed.

Saying “Thank You”

language corner • Lee MILLER

In this issue we introduce a new English-language column devoted to questions about Esperanto usage.

Q: How do you say, “Thank you for accepting me”?

A: I frequently see comments in this form:

- a. Dankon por akcepti min.
- b. Dankon pro akcepti min.

In Esperanto usage, *pro* is not followed by an infinitive. Sentence (b) is incorrect. If you want to use *pro*, you have to use a form like:

Dankon pro tio, ke vi akceptis min.

Dankon pro la akcepto en la grupo.

The preposition *por* can be used with an infinitive, but generally with the meaning “in order to X.” So for example,

Mi aĉetis farunon por baki panon.

Mi pagis multe da mono por havi ĝin.

So my advice is to avoid both (a) and (b) above. They are attempts, I think, to model the English structure

“Thanks for accepting me.” But that particular structure doesn’t exist in Esperanto. Another option in addition to the two I gave above is:

Mi dankas vin, ke vi akceptis min.

Is there an absolute logical reason why *pro* can’t be used with an infinitive, or why *por* before an infinitive means “in order to”? No. But this is a good example of how usage is one of the predominant factors in how Esperanto is actually spoken.

When you learn Esperanto, you become part of an established speaker community, and there are usage-based rules within that community.



Lee MILLER

Liĉjo is a member of the *Akademio de Esperanto*, an expert Esperanto instructor, and he has administered the *Duolingo Esperanto Learners* Facebook group since its inception in 2015.

<licxjo@gmail.com>

Sabaton

senintenca esperantaĵo • HOSS FIROOZNIA



“Kaj vi, metalrokemuloj, observu la Sabaton, ĉar ĝi estas sankta por vi ...”

Jen foto de artaĵo sur t-ĉemizo, kiun mi vidis en Sterling, Novjorkŝtato. Unue mi demandis al mi, “Do kial okazos la ‘lasta defendo’ je la tago inter vendredo kaj dimanĉo?” Sed danke al posta esplorado per Google, evidentigis, ke *Sabaton* estas populara metalrokbando el Svedujo.

Mikronoveloj

Mikronoveloj estas ege koncizaj rakontoj, ofte malpli ol 300 vortojn longaj. Por nia mikronovelero-rubriko ni aldonas kroman defion: rakontoj devas esti precize 100 vortojn longaj – nek pli, nek malpli. Ĉu vi emas verki tiel? Sendu viajn centvortajojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

Klareco

Li iris el la ŝoseo al la mallarĝa kampara vojo. Estis arbaro ambaŭflanke. Sciuro impetis antaŭ la aŭton, kaj li malrapidiĝis. Du mejlojn pli fore, li haltis apud la vojo. Neniu estis tie je la sepa matene. Pado etendiĝis laŭlonge de rivero rapide fluanta.



Pensoj opresaj kaj frivilaj saltis en lia menso, postulante atenton, kvazaŭ simioj svingantaj tra la arbosuproj. Li lasis la pensojn salti en la riveron kaj forflui. Adiaŭ. Zorgoj kaj ĉagrenoj sin prezentis. Li levis la kapon por vidi la blankajn nubojn. La zorgoj forflosis kaj malaperis. Birdo kantis, kaj venteto trafis lian vizaĝon. Ho, klareco!

— Richard Houk <brichardh@hotmail.com>

Poste

Mi ne scias kial, sed mi ne povas fari tion nun. Sed poste. Mi faros tion poste. Kiam? Kiam mi havos pli da tempo. Kiam la vivo lasos min vivi. Mi ja tiam verkos libron, majstroverkon, epopeon. Vi vidos. Ĉiu volos ĝin. Ĉiu legos ĝin. Ĉiu aĉetos ĝin. Mi sentas, mi sentas, ke la temp' estas preta por tia grandioza ... majesta ... poezia ĉefverk'. Decidite. Mi komencos ĝin morgaŭ.



“Kio estas tio?” demandis la serĝento al la kuracisto, kiu malkovris la kadavron.

“Estas papereto, kiun li tenis premita en sia mano, kiam ni trovis lin. Frenezajo pri epopeo aŭ io tia.”

— Maurizio GIACOMETTO <mbaesperanto@btinternet.com>

Impulso

Antaŭlonge, ŝia patrino suferis strangan nerezisteblan impulsjon, ŝiaopinie simptomon de maljuneco, ĉagrenan sed samtempe amuzan. Starante en butiko, ŝi pripensas panjon, longtempe mortintan, kaj zorge rigardadas ekspozicion de varoj.




Nuntempe ŝi mem estas maljuna. La genuoj foje doloras, la dorso ĉiam, kaj kiel panjo, ŝi maltrankviliĝas pri aferoj antaŭe nezorgigaj. Pliaĝiĝante, oni ekkomprebas gepatrojn – kion ili travivis, kial ili tiel agis. Retrospektive, ili ne ŝajnas tiel frenezaj. Oni eĉ ekkonstatas, ke ili kelkfoje pravis.

Krome, fulmotondro prognoziĝis, do – vere – estus prudente. Ŝi jetas alian ujon de Duracell-oj en la vendejcareton: Kiel panjo ĉiam diris, ne eblas havi tro da piloj.

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

Literature

Li neniam trovis sian ĝustan lokon en la vivo. En bonaj postenoj li ne daŭris, ne havis amikojn porĉiamajn, ne trovis amon puran, eternan, fidelan.



Iel li estis viva nur en la literaturaj paĝoj. Tie la tutan tempon li restadis. Tie li amis, ĝojis. Tie li suferis, klopidis. Frazon post frazo.

Venis tamen la lasta ĉapitro. Subite li komprenis la sencon de sia sekaj ekzisto. Ĝi troviĝis nur en la okuloj de tiu leganto. Terura paniko superŝutis lin. Eskapo aŭ morto. Kion fari nun? Ĝuste tiam oni malŝaltis lastan fojon la malnovan bitlibron, antaŭ ol ĵeti ĝin en la recikligejon.

— Maurizio GIACOMETTO <mbaesperanto@btinternet.com>

More software suggestions for building vocabulary

lingviko • Joshua HOLZER

Jeremy Genovese's article in issue 2022:3 did a great job of explaining the benefits of spaced repetition software. I'd like to add a few more suggestions.

Like many others, I was introduced to Esperanto through Duolingo. As I progressed in the course, I found myself forgetting words from earlier lessons. This led me to search for a flashcard program to supplement Duolingo.

As Jeremy mentioned, Memrise has many benefits: it's free, cross-platform, and there are many user-created decks. However, it is not easy to edit any of those decks. Sometimes I'd run into a word in Duolingo that wasn't in the Memrise deck. Or the word had additional meanings that weren't entirely reflected in the deck. Sometimes I would just encounter a new word "in the wild" and there was no easy way to add it to a pre-existing deck. I could create new decks, but then I'd be juggling several simultaneously, which would feel overwhelming.

So I continued my search for an alternative program. Eventually I discovered Anki, which is a romanization of the Japanese word for "memorization" (暗記). The **web version** <<https://apps.ankiweb.net/>> is free, but the iOS version has a one-time charge of \$25. Caution: don't be tricked into buying cheaper competitors that have similar-sounding names. Anki is well worth the price, as it is extremely powerful.

A downside: Anki is not very user-friendly in comparison to Memrise. The learning curve can be a bit intimidating for beginners. However, its power lies in its flexibility. With Anki, I can add flashcards whenever I want, and I can edit them whenever I want. I can add synonyms, related words, and even change the formatting of the cards. Nearly everything is editable.

I quickly found myself in a groove where I'd first open Anki to review past cards. Then I'd open Duolingo and push forward into new material. Each new word would get added to my Anki deck to be reviewed later. Bouncing back and forth between the

two programs helped me move through the course faster and better retain what I'd learned.

After finishing the Duolingo course, I looked for new ways to continue expanding my vocabulary.

Eventually, I came across **LingQ**

<<https://www.lingq.com/en/>>, which was created by Steve Kaufman, a purported polyglot who claims to know 20 languages. His philosophy is to immerse oneself in content. LingQ has a free version, but it is very limited. There are a variety of recurring payment plans, but if you are serious about using the program long-term, I would consider opting for the **lifetime plan** <<https://bit.ly/3tJ4jUV>>, with a one-time charge of \$199 per language.

LingQ has a variety of curated content that should keep one busy for a while. But the best part of LingQ is that anytime I come across an interesting article in Esperanto, I can easily import it and read it on my iPhone or computer. While reading the article, if I encounter an unfamiliar word, I can click on it, and the definition will appear. If I want, I can then add the word to a vocabulary list built into the program.

In short, LingQ makes it easy to read things without having to repeatedly stop and look up words in a dictionary. Once a week or so, I'll go to the LingQ website on my computer, open the vocabulary list that LingQ built for me, and add each word to my Anki deck. Then I'll press Anki's "sync" button, and the new words get zapped to my iPhone for review.

\$224 is a lot to spend, but if you do most of your Esperanto studying and reading from your iPhone or computer, Anki and LingQ are *very* helpful.



Joshua HOLZER

Joshua is an Assistant Professor at Westminster College in Fulton, Missouri, where he teaches Political Science.

<josh.holzer@westminster-mo.edu>

Sensata

senintenca esperantajo • Greg KIRCHMAIER



Ĉu priskribo de teknologio tiel vorema, ke ĝi estas

ĉiam sen sato? Aŭ ĉu temas pri iloj por eviti anojn de la **Sennacieca Asocio Tutmonda**

<[https://eo.wikipedia.org
/wiki/Sennacieca_Asocio_Tutmonda](https://eo.wikipedia.org/wiki/Sennacieca_Asocio_Tutmonda)>?

Leganto Greg KIRCHMAIER afable sendis la jenan foton de t-ĉemizo, kiun li trovis en brokantejo en Santa Barbara, Kalifornio. Indas noti, ke la vorto *sensata* aperas ne nur skribite, sed ankaŭ brajite.

Laŭ **klarigo de la firmao** <[http://sensata.com
/about](http://sensata.com/about)>, ĝia nomo venas de la latina *sensate*, rilate al sensado. Kaj ne surprize, ĝi vendas aparatojn por detekti kaj mezuri aferojn sens-atajn.

Kolofono

Redaktoro/Editor: HOSS FIROOZNIA

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu inter proks. 500–1500 vortoj longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kune kun via nomo, adreso kaj foto. Kun ĉiu(j) alia(j) fotoj bonvolu sendi informon pri dato, loko, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevitajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas havebla laŭ la permesilo CC BY-SA 3.0 <[https://creativecommons.org
/licenses/by-sa/3.0/deed.eo](https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/deed.eo)>. Cetere ni petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej frēsajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre reprezentas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj bv. legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; preferred length for an article is between 500–1500 words. Please send materials by email if possible and include your name, address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer along with subject(s), location, and date. We will return contributions received by postal mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons license BY-SA 3.0 <[https://creativecommons.org
/licenses/by-sa/3.0/](https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/)>. As a courtesy, we ask that you wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors should consult the deadline calendar and style guide on our website.